

Eventoj

Redakcia adreso:
Budapest, pk. 87.
H-1675, Hungario
Telefono kaj telefakso:
(+36-1) 1288-258

Internacia Sendependa Gazeto pri la Esperanto-Movado

januaro (2) - '93

Ĉu UNO tamen parolu esperanton?

SUPERLINGVO

Mi malamas polemikojn, sed por mi silenti post legado de artikoleto de Majk SADLER, "UNO ne parolu esperanton" (en *EVENTOJ*, n-ro 008, junio/2 1992, p.2.) estus pli ol krimo, estus eraro, se decas, ke mi reuzu vortojn de Talleyrand post la ekzekuto de dukoj d'Enghien.

S-ro Sadler reformulas la argumentojn de plej fiaj malamikoj de esperanto kvazaŭ temus pri popolaj bonmensaĵoj, pri evidentaj bone konataj. Ĉu li estas trompita, aŭ ĉu li volas trompi, scii mi ne povas...

- Li opinias, ke la malgrandecoj de internacia-naciaj, nacia-internaciaj vortaroj, kompare al nacia-naciaj, pruvas ion pri la malabundo de esperanta vortrezoro. Li eltiras argumenton el la malriĉeco de niaj eldonejoj kaj konfuzas inter vortprovizo reala de nia lingvo kaj terminaro enlibrigita. Ĉu eblas, ke li konas la 15an regularon de la Fundamenta gramatiko? *La tiel nomataj vortoj 'fremdaj', t.e. tiuj, kiujn la plimulto de la lingvoj prenis el unu fremda fonto, estas uzataj en la lingvo esperanto sen ŝanĝo, ricevante nur la ortografion kaj la gramatikajn finaĵojn de tiu ĉi lingvo:...* Tio signifas, ke sufiĉas, ke mi sciu,

ke la scienca nomo de kverko estas 'Quercus silvaticus' por scii la nomon de tiu ĉi arbo. Centmiloj da kreskaĵoj, insektoj, bestoj havas siajn internaciajn nomojn, kiuj estas la sciencaj. Ĉiuj sciencoj kaj artoj havas siajn interkonsentitajn fakvortarojn (latine, angle, france, germane, itale - ĉu tio gravas?) kiuj, rajte de la 15a regulo, estas internaciaj kaj senpere utiligeblaj en esperanto. Ĉu vere utilis, ke ni eldonu vortaron entenantan la nomojn de miliono da insektoj? Centmiloj da kreskaĵoj? Milojn kaj milojn da fizikaj, kemiaj, fiziologiaj fakvortoj? Dum la konferenco de Filozofiaj Societoj en Brighton en 1988a mi lon-

ge diskutadis je la plej alta faka nivelo kun filozofoj scipovantaj esperanton. Ni ĉiuj scipovis ankaŭ la anglan, preskaŭ ĉiuj la francan, tamen la diskutado la plej preciza, la plej flua okazis en esperanto. La fakto, ke plejparto de fakaj terminoj, kiujn ni uzadis ne troviĝis en PIV, sed kun formo iom malsimila en Lalande-, Abbagnano-, Angeles-, Runes- kaj aliaj fakvortaroj tute ne estis ĝena. Ĝuste la fakto, ke la uzado de faklingvaĵo en la grandaj lingvoj estas elprovita, provizas esperanton per ĉiuj necesaj fakaj vortoj, ĉar 'la grandaj lingvoj' estas fontolingvoj de esperanto. Oni devas kompreni, ke esperanto ne estas malamiko de 'la grandaj lingvoj', nek ilia konkurenco; ĉi estas superlingvo kreskanta el ili kaj utiliganta iliajn esprimkapablojn en funkcio internacia. Ĉion, kion oni kapablas esprimi en la angla, la franca, la germana, ktp, oni kapablas plifortkiale kaj ĝuste ĉikiale esprimi en esperanto.

- ... ĉu ni vere volas, ke ĝi fariĝu tiel nuanca kaj precizeca kiel aliaj lingvoj? Ne, sinjoro Sadler, ni ne volas, ke ĝi 'fariĝu', ni scias per ĉiutaga uzado kaj verkado, ke ĝi estas, jam nun ĝi

estas, pli nuanca kaj pli preciza ol ĉiuj aliaj lingvoj. Plejparto da homoj ne kapablas elprofiti la eblojn de la franca, aŭ de la angla. Averaĝa franclingvano utiligas 4-5000 el la pli ol 300 000 terminoj en TLF (*Trésor de la Langue Française*, ĉirkaŭ 40 volumoj), ĉu ĉi tio pruvas, ke la franca ne taŭgas kiel politika, fakscienca, ktp. interlingvo? Sed ja eĉ la 'basbretona' taŭgas, se ĝiaj parolantoj kapablas koncepti la temaĵojn, kiujn vi preparolas. La eblaĵoj de esperanto, pro la naturo mem de

ĉi tiu lingvo, estas ege pli multaj, ol tiuj de ajna etnolingvo. Ĉi tion facile pruvas kiu ajn majstranta la Fundamenton, ĉar li kapablas aktive uzadi pli ol 20 000 terminojn, superante la plej vortoriĉan francan verkiston Victor Hugo.

Se multaj esperantistoj ne estas trejnitaĵ kreive fari kaj kompreni nerenkontitajn vortumojn, kulpas la lingva imperialismo, kiu zorge distancigas

esperanton de mezlernejoj kaj universitatoj, ĉar ĉiuj homoj parolantaj aglutinajn gepatrajn kaj kulturajn lingvojn perfekte kapablas kreadi la kunmetaĵojn novajn, originalajn, en neniu vortaro ekzistantajn, kiujn necesigas iliaj konceptoj. Sed tio ĉi


gravas precipe en beletro, en sciencoj la terminoj estas pretaj en fakvortaroj de internaciaj sciencaj societoj. Sufiĉas, ke oni utiligu ilin.

- En ĉiuj lingvoj ekzistas lingvonivejoj. Mi ne parolas en mia karate-klubo je la sama lingvonivelo, kiel en kunveno de Filozofia Asocio Tutmonda... La argumento de s-ro Sadler pri facila lernebleco estas senvalora, ĉar unufleke senutila lingvo eĉ facile lernebla restas senutila, aliflanke fundamenta lingvonivelo estas atingebla per sama facileco kiom ajn granda estas la beletra kaj faka vortotrezoro de lingvo. Homoj uzadas nur vortojn, kiujn ili bezonas, kaj klera homo ĉiam estas kapabla klarigi siajn vortojn al homoj, kiuj reale volas ilin kompreni.

...Mi ne esperas lin konvinki, mi ne opinias, ke tio estas ebla. Mi volus protekti niajn bonfidajn kolegojn kontraŭ korodiva efiko de supraĵe verŝajnaj argumentoj de ruzuloj, kiuj klopodas elinterne nin anemiigi.

Eugène de ZILAH
El "La Gazeto", nr-o 42, 30 okt. 92.

Esperanto



Organizaj demandoj

ESPEROJ KAJ ILUZIOJ

Antaŭ unu jaro dum la 2a Eŭropa Esperanto-Forumo (Kaunas, Litovio, 1991.09.28.-10.05) la partoprenintojn regis precipe du sentoj: espero kaj iluzio.

Oni esperis, ke multaj revoj de Mez- kaj Orient-Eŭropanoj pro la ĉeso de diktaturo (eĉ se ĝi estis mola), baldaŭ realiĝos. Sed la iluzioj, kiel la glacio se renkontas varmeton, laŭgrade jam dum la forumo degelis. Ĉi kaze la degelon kaŭzis Okcidenta Eŭropo, de kie ne venis la esperita kunlaboro, ja neniu Okcident-Eŭropa Landa Asocio sendis decidrajtan reprezentanton al la Forumo, sekve la forumanoj restis en la sama rondo, kiel antaŭe dum la konsultigoj de soclandoj. (Eĉ male, estis aranĝita alternativa forumo, nomata Eŭropa E-Kongreso en Verona.)

Unu iluzio do estas for, nome: la malapero de la "fera kurteno", falo de la berlina muro ne aŭtomate kreas kunlaboron inter eŭropaj esperantistoj. Ni longe devas ankoraŭ peni minimume en du direktoj: unua estas, ke ni mense preparu nin mem por tuteŭropa kunlaboro, la dua ke ni serĉu la konvenajn kadrojn de kunlaboro.

La organiza formo *landa asocio* estas bezonata pro la malsamaj leĝoj de ŝtatoj, sed la plimulto de agadoj okazantaj en ilies kadroj, efike estas realigeblaj nur en internacia kunlaboro. Pro tio konsilindas, ke la landaj asocioj jam dum la projekta etapo de la planado serĉu la eksterlandajn partnerojn por la apartaj taskoj. Kaj por realigi konkretajn taskojn oni povas efike kunla-

bori el la proksimaj landoj, el la sama regiono (geografie, socie, kulture, lingve k.s.).

Por ni mez-eŭropanoj, estas vivgrave daŭrigi eĉ fortigi la iaman kunlaboron inter la Mez-Eŭropaj landoj, kies kernon povas doni - laŭ la nunaj traktadoj - esperantistoj de Ĉeĥa, Hungaria, Pola kaj Slovakia E-Asocioj.

Komprenoble paroli pri kunlaboro nur indas tiam, se ni havas taskojn, kiujn (pli efike) eblas solvi nur en internacia kunlaboro.

Jen kelkaj konkretaj taskoj, por kies realigo indas kunlabori:

A. Produkti valorojn

1. Prilabori vortarojn por ĉiuj lingvoj uzataj en la koncerna lando. Se ĝi jam ekzistas, ampleksigi ĝin.
2. Fondi publikan E-bibliotekojn.
3. Fondi E-kulturcentrojn.
4. Kompili grandan enciklopedion de la homaj konoj, ke estiĝu bazo de aliaj spiritalaj produktaĵoj.
5. Aĉeti propran domon sur propra tereno por fondi eron de Esperantujo, kio povas esti bazo de sekvaj agadoj.
6. Instali e-lingvaj informilojn en la publike viziteblaj lokoj.

B. Laŭpaŝa oficialigo de esperanto

1. Samrajtigi esperanton en la lingvoekzamenata sistemo de la lando.
2. Atingi, ke e-o estu elekta lingvo samrange, kiel la aliaj.
3. Atingi, ke e-o fariĝu fako de instruistoj.
4. Instigi la uzadon de e-o ĉe turismaj oficejoj.
5. Fondi turismajn sekciojn de la E-Asocioj.

Oszkár Princz, Hungario

La membraro de UEA en 1991

KIOM?

En 1991 la individua membraro de la Universala Esperanto-Asocio atingis 8.071 personojn, t.e. 426 pli ol en 1990. (Fonto de datumoj: revuo Esperanto, 3/92.) Estas interese, ke plej multajn anojn UEA havis en la fora 1925a jaro - 9.424.

Konstateblas, ke pli ol duono (57.5 %) de la individua membraro loĝas nur en dek landoj:

Francio	728	Germanio	640
Usono	545	Brazilio	489
Nederlando	459	Japanio	380
Polio	369	Svedio	365
Britio	362	Italio	304

En 12 landoj de la eksa Sovetio nun estas 370 individuaj membroj de UEA. Rusio kun 173 membroj rangas sur la 15-a loko.

La aligita membraro (membroj de la aligitaj landaj asocioj) daŭre malkreskas. Nun estas 19.146 tiaj membroj. Tial la totala membraro de UEA dum kvar jaroj falis de 43.642 personoj (en 1987) al 27.217 (en 1991).

Jen la listo de la unua landodeko, kiu tegmentas 64,8 % de la aligitaj membroj:

Ĉeĥoslovakio	2346	Hungario	1964
Bulgario	1250	Italio	1160
Germanio	1091	Ĉinio	1090
Japanio	1020	Svedio	981
Britio	780	Belgio	716

el Ruslanda Esperantisto, 11/92.

Konkurso

REGULARO PRI LA BELARTAJ KONKURSOJ DE UEA

Artikolo 3. (daŭrigo kaj fino)

6) La komisiono laboras skribe. Ĉiu juĝanto elektas el la konkursaĵoj senditaj al li por prijuĝo la dekdu plej bonajn kaj notas sur ili la vicordan numeron laŭ iliaj relativaj meritoj. Se en la koncerna branĉo partoprenas malpli ol dekdu konkursaĵoj, la juĝanto vicordigas ilin ĉiujn. Se juĝanto opinias du aŭ pliajn verkojn egale meritaj, li povas doni al ili la saman vicordan numeron. La liston de la vicordaj numeroj ĉiu juĝanto sendas al la sekretario por atingi lin plej malfrue je la 31-a de majo. Krome, ĉiu juĝanto preparas superrigardan raporton pri la meritoj kaj la malmeritoj de la konkursaĵoj, kaj ĝin sendas al la prezidanto, por atingi lin plej malfrue je la 15-a de junio. Ricevinte ĉiujn aljuĝolistojn, la sekretario sumigas la individuajn aljuĝojn, alskribante

dekdu poentojn por unua loko, dekunu poentojn por dua loko, dek poentojn por tria loko, kaj tiel plu. En ĉiu branĉo oni deklaras la unua tiun konkursaĵon, kiu ricevis la plej multajn poentojn, la dua - tiun, kiu ricevis la due plej multajn poentojn, kaj la tria - tiun, kiu ricevis la trie plej multajn poentojn. Se ne revenas ĝustatempe unu poentotabelo, la sekretario petu voĉon de la prezidanto por decidiĝi pri aljuĝo de premio(j). La sekretario informas pri la rezultoj plej malfrue je la 15-a de julio la prezidanton, la membrojn de la Komisiono, la estraron pri kulturaj aferoj kaj ĉiujn premiitojn. La prezidanto preparas surbaze de la raportoj senditaj al li de la juĝantoj ĝeneralan raporton pri la konkursaĵoj, kaj oni ĝin presigas, komplete aŭ resume, en "Esperanto" aŭ alia revuo de UEA.

7) La komisiono povas difini malpli ol 3 premiojn en iu branĉo. Se ĝi donas en iu branĉo nur du premiojn aŭ nur unu, ĝi decidas, ĉu la premioj estas de unua aŭ dua aŭ tria merito. Se du aŭ pli da konkursantoj ricevas egalan nombron da poentoj, ĉiu el ili ricevas la saman premion, krom en la branĉo eseo originala (Premio Luigi Minnaja), kie ĉiu ricevas egalan parton de la unusola premio.

Katalogo pri planlingvaj (inkluzive esperantaj) periodaĵoj

Rondo "TAKÁCS" eldonos bultenon!

La "Rondo Takács" kiu okupiĝas pri registrado kaj katalogado de planlingvaj periodaĵoj (pli detale vidu en *EVENTOJ* aŭgusto -1-92) por publikigi la ĝisnunajn datumojn eldonos bultenon.

La bulteno "Periodaĵoj" jam ricevis la ISSN-kodon (1216-7800), kaj aperos jene: vintre kaj somere ĝi aperos kiel suplemento al la gazeto *EVENTOJ*, krome ĉiun duan monaton ĝi aperos en ĉ. 200 ekzempleroj ĝi aperos por tiuj, kiuj

- regule informados la Rondon pri periodaĵoj en aŭ pri e-o aŭ aliaj planitaj lingvoj;
- donacos al Rondo Takács minimume 1 kg-on de la menciitaj periodaĵoj el kiu ajn lando. (Dankon al s-aŭo Ikai el Japanio, kiu jam sendis dek (!) kilogramojn de taŭgaj eldonadoj).

Ĉiuj informoj estas bonvenaj ĉe:

*Rondo Takács, d-ro Árpád Máthé
Tusnádi u. 14, H-1125 Budapest, Hungario*

Arangoj

E-kongreso en Japanio

La 41-a "Kongreso de Esperantistoj en Kansajo" okazos inter 29-30 majo '93 en la urboj Katakano kaj Hirakata (en la gubernio Osaka).



La arangon organizas *Esperanto-Societo en Hirakata kaj Kansaja Ligo de E-Grupoj (KLEG)*, kaj aŭspicias "la urbo Hirakata" kaj ĝia eduka komitato.

La kongresa kotizo: 4000 enoj (ekzistas diversaj rabat-ebloj). Tranokto kaj du manĝoj: 6300 enoj.

Pliajn detalojn petu de:

Kansaja Ligo de Esperanto-Grupoj (KLEG), sone-Higasi-mati 1-11-46-204, Toyonaka-si, 561 Japanio.

Telefonofakso: +81-6-8411928

Internet: hottasan@ho.shs.sumiden.co.jp

Devizo: "Frandu Esperanton!"

Seminario kaj jarkunveno en Argentino

Argentina E-Ligo invitas al la Seminario de Esperanto, okazonta inter la 8-a kaj 11-a de aprilo en Villa Carlos Paz (montaro Cordoba).

Okazos debatprelegoj "Informado kaj instruado de esperanto" kaj "La scienco kaj esperanto", kafo koncerto (arta festa kunveno tute en e-o), jarkunveno de AEL kaj diversaj ekskursoj. Pliaj detaloj ĉe:

Argentina Esperanto-Ligo, C. Correo 407, RA-2600 Venado Tuerto.

Internacia Konferenco de Amerikaj E-Asocioj

Kuba E-Asocio invitas ĉiujn E-asociojn de la Amerika Kontinento partopreni en la internacia konferenco, okazonta en Havano, en la unua semajno de marto 1993, celante plivastigi la internaciajn kontaktojn kaj kunlaboron.

Laŭ la faldfolio Kuba E-Asocio disponas pri propra domo (sidejo de la Asocio) kun pluraj ĉambroj, el kiuj du estas speciale rezervitaj por gastoj kun kapacito por 12 personoj. Tranokto kun matenmanĝo kostas 10 USD.

Pliaj informoj:

Kuba E-Asocio, Apartado postal 2018, C-10200 La Habana, Kubo.

Stratadreso: Vista Alegre 264, entre Luz Caballero y Juan B. Zayas, La Vibora.

KUKO-BAKO

Leipzig, 25.02. - 03.03.1993.

E-Junularo de Leipzig organizas "Semajnon de kukobakado". Se vi scias baki kukojn aŭ vi ŝatus lerni novajn metodojn - ankaŭ vi estas bonvena!



Kompreneble krom la bakado - en mallonga kurso vi povos konatiĝi kun la kuireja e-terminologio, konatiĝos kun la fama bakajo de Leipziga Alaŭdo, kaj vizitos ankaŭ la urbajn famaĵojn. - Logado ĉe anoj de nia societo senpage, vi devas kontribui finance nur al la komuna manĝaj-aĉetado.

Pro la karaktero de kunveno la nombro de ĉeestontoj estas limigita je 20, do por certe havi lokon necesas frue aliĝi ĉe:

E-Junularo de Leipzig, c/o Wolfram Diestel, Bauvereinstr. 3, DO-7113 Markkleeberg, Germanio

Telephone: +49-341-327487

Mediterraneo, ĉu kolizio aŭ integriĝo?


TEJO/KER SEMINARIO

en Pula (Kroatio) de la 30-a de aprilo ĝis la 4-a de majo 1993

La ĉefa celgrupo estas junaj e-aktivuloj (sub 30 jaroj) el la landoj de la Komunumo de Eŭropo.

Ni antaŭvidas, ke ĉiu partoprenanto serioze kaj aktive kontribuu al la programo kaj prioritare akceptos nur tiujn, kiuj tion faras kaj anoncas.

Aliĝu baldaŭ, ĉar ekzistas nur 40 partoprenlokoj.



Programkontribuojn sendu al: Aline Boulet, 43, avenue du Mine, F-75014 Paris, Francio; tel.: +33-1-4538-5419

Vian aliĝon sendu al:

Nataša Majer, Zagrebačka 123, HR-43216 Vrbovec, Kroatio; tel: +38-43-755 255

Surbaze de komputila esploro de parolata esperanto

ZAGREBA METODO DE LA ESPERANTO-INSTRUADO

Zagreba metodo estas la lernolibro kaj la helpiloj por la esperanto-instruado, kreitaj en *Internacia Kultura Servo, IKS*, post du jardekoj da e-instruado ĉe diversaj kursoj en Zagreb. Ĝi celas prezenti al la kursanoj nur kernan esperanton en 12 lecionoj, kaj kuraĝigi la lernantojn persisti kaj daŭrigi la lernadon post la unuaj atingoj.

La baza lernolibro baziĝas sur la plej ofta vortrezoro kaj la plej oftaj gramatikaj difinitaj per komputila esplorado de la parolata lingvo.

La *Zagreba metodo* estas adaptita al multaj lingvoj. Nun oni posedas la lernolibron en la angla, germana, kroata, franca, kirunda, itala, hungara, finna, malta, korea, portugala, japana, kataluna kaj bulgara lingvoj.

Preparataj estas la lernolibroj ankaŭ en la sveda, hispana kaj albana.

Kasedo, facillingva legaĵo, lernolibro por progresintoj estas aldonaj instrumaterialoj. La lernolibron laŭ la *Zagreba metodo* kompletigas per siaj kanzonoj Claude Piron, laŭ kies teksto estas eldonita ankaŭ aldonaj bild-rakonto.

Internacia Kultura Servo ŝatus scii, kie en la mondo en 1992. oni instruas laŭ la *Zagreba Metodo*. IKS ŝatus resti en kontaktoj kun la instruistoj aplikantaj la

ZAGREBA METODO



metodon, kaj petas ilian siananoncon por proponi pliajn servojn.

Kie aĉeteblas la lernolibroj?

- Cooperativo Editoriale Esperanto, Via Villorosi 38, I-20143 Milano, Italio;
- Csizsár Ernő, Erdődy Pálffy T. u. 25, H-8100 Várpalota, Hungario;
- Irja Klemola, SF-20660 Littoinen, Suomi-Finnlando;
- Esperanto-Societo, P.O. Box 142, Valetta, Malta;
- Korea Esperanto-Junularo, Shinmunno 2-6 A, Chongno-gu, Seoul 110-062, Koreio;
- Zamenhof Editores, Cx. postal 1531, BR-74.001 Goiania-GO, Brazilio;
- S-ino Ĉieko Doi, Niŝiŝiba 4-17-9, Kanazawa-ku, Yokohama-si, 236, Japanio.

Por aliaj lingvoj kaj landoj demandu vian kutiman libroservon, aŭ skribu rekte al:

Internacia Kultura Servo, pk. 499, HRV-41000 Zagreb, Kroatio.

Tel: +38-41-429-566

Telefakso: +38-41-421-294.

Faka aplikado

ESPERANTA JURA ASOCIO



Ma Rafaela Uruena

multjare prezidis la altranga esperantisto D-ro Ivo Lapenna.

La unua jarkunveno de la Esperanta Jura Asocio (E.J.A.) okazis sub la gvidado de s-ro Ian Jackson nome de provizora gvidantaro la 2-an de aŭgusto de 1991 kadre de la 76-a UK (en Bergenjo).

En tiu kunsido oni elektis la jenan estraron por la ofikado en 1991-94:

- Prezidanto: M^a Rafaela Uruena (Hispanio)
- Sekretario: Ian Jackson (Britio)
- Voĉdonanto: Povilas Jegorovas (Litovio)
- Voĉdonanto: Gianfranco Polerani (Italio)

La statuto antaŭvidas kvinpersonan estraron, do vakas unu loko. La farendaj taskoj estas multaj kaj diversaj: laborgrupoj por studi fakajn temojn, anglajura terminaro (jam prizorgata de Ian Jackson), terminologio, ktp... Iom post iom ni klopodas plenumi ĉiujn.

La Esperanta Jura Asocio intencas baldaŭ fariĝi faka asocio de UEA, kiel multaj aliaj en la sino de la Universala Esperanto-Asocio.

Ĉar laŭ la nova statuto rajtas membriĝi ne nur juristoj, sed ankaŭ studentoj pri juro, do krom la sinanonco de advokatoj, juristoj ktp. estas atendataj ankaŭ la studentoj pri juro.

Viajn leterojn atendas, kaj volonte donas pliajn informojn

*D-ino M^a Rafaela Uruena,
Av. Ramon y Cajal 12, 2&-C,
E-47011 Valladolid, Hispanio.
el Boletín de HEF, n-ro 306, 1992.*

HOMEOPATIO

De la 25-a ĝis la 29-a de julio okazos en la urbo Ribeirao Preto (SP) la 54-a Tutamerika Medicina Kongreso de Homeopatio, kiu flanke de la programo por profesiuloj prezentos ankaŭ programojn por la ĝenerala publiko. Inter ili menciindas "Kurso de homeopatio en la hejmo" kaj "Lanĉo de libro de homeopatio". Ambaŭ eroj estos esperantlingvaj.

Ĉiuj interesiĝantoj pri la temo povas aliĝi al tiu kongreso. Pliajn informojn petu de:

*Instituto de Homeopatio, IHFL,
Rua Americo Brasiliense 1418,
CEP 14015-050, Ribeirao Preto (SP) Brazilio.
laŭ Ligilo el Brazilio n-ro 16.*

"MONDA TURISMO" proponas kunlaboron

La pasinta jaro 1992 estis tre malfacila por la internacia E-turismo.

Bataloj en la eksaj Jugoslavio kaj Soveta Unio, neofaŝismaj ekscesoj en Germanio ks. timigas homojn vojaĝi. Malgraŭ ke pluraj landoj likvidis vizojn - aliaj pli forte diskriminacias, ekz. preskaŭ ne eblas ricevi kanadan vizon, la usonan ricevas nur ĉiu deka kandidato (antaŭe ricevis ĉiu kvina), ofte oni rifuzas vizojn hispanajn kaj grekajn, havante en pasporto israelan vizon ne eblas viziti arabajn landojn ktp. Por eks-sovetianoj kostoj de vizo egalas al monata salajro. Ĉinoj ne ricevas pasportojn sen invitletero en ĉina lingvo, konfirmita de loka notario kaj ĉina konsulo. Tiel aspektas la t.n. "demokratio" kaj "respekto de homaj rajtoj".

Antaŭe estis politika disdivido de la mondo - nun ekonomia. Antaŭe okcidentanoj ne veturadis orienten, ĉar ne volis peti vizojn kaj plendis pri malplenaj magazenoj. Nun ili ne plu bezonas vizojn kaj magazenoj estas varplenaj - sed okcidenta esperantisto en la oriento plu estas raraĵo... Ĉu denove ni perdas ŝancon por esperanto?

Malgraŭ la problemoj la organizo "Monda Turismo" kontaktas nun kun 115 landoj, kaj esperantistoj vojaĝadas organizite tra pli ol 60 landoj de la mondo. Ni elkore invitas vin en 1993 speciale al:

- » 9a Internacia Simpozio de "Monda Turismo" en Budapeŝto (12-16 julio)

- » 9a Ĝenerala Konferenco de MT en Poprad (16-18 julio)
- » Kunveno de MT kadre de la 78-a UK en Valencio (24-31 julio)
- » 19a Internacia Foiro de e-turismo en Bydgoszcz (25-30 septembro).

Bydgoszcz lastjare fariĝis vera kontakt-centro inter orientaj landoj - ankaŭ por la eksaj respublikoj de Sovetunio. Paralele al turismo evoluas ankaŭ la komercado. Bazarumi dum la Universalaj Kongreso de Esperanto ne decas, tute prave, tamen ĉiu povas veni al ni en Bydgoszcz kaj ĉi tie trovos merkaton por siaj varoj. Ĉiumonate okazas kunveno de esperantistoj el tuta Polio, kio



ege faciligas Vian komercadon. Se Vi ne sukcesas vendi viajn varojn - ni povas akcepti ilin komisie por pluvendado. Do, skribu al ni kaj venu kun viaj varoj!

Bone funkcias la ĉi-jare establita Kultura Centro en Bydgoszcz kun ĝiaj naciaj semajnoj. Okazis jam la armena, latva, pola, rumana, rusa, ukraina, kaj sekvos la belga, hungara kaj aliaj. Jam nun ni akceptas sinproponojn de prelegantoj por la kultura jaro 1993/94 - kaj ankaŭ aliĝojn de gestudentoj por la Internacia Studumo pri turismo kaj komerco por la studjaro '93/94.

Dank' al litovoj, rusoj k.a. nia 30 persona hotelo ofte devas akcepti samtempe preskaŭ 50 turistojn. Kiu volus investi por alkonstrui plian etaĝon? La financaj kondiĉoj estas negoĉeblaj surloke - bonvenon.

*mag. Andrzej Grzebowski,
prezidanto de "Monda Turismo"
ul. M. Skłodowskiej Curie 10, PL-85-094
Bydgoszcz, Polio
Telefaksno: +48-52-415744*

Teksta procesilo "LEKSIKONO"



Por kontribui al disvastigo de internaciaj ligoj de Rusio, kvar firmaoj (rusa-hungara firmao MICROINFORM, la Centro ESPERANTO-KULTURO-EKOLOGIO kun apogo de REU kaj Esperantotur) proponas elabori esperantan version de la teksta procesilo LEKSIKONO.

"Leksikono" estas ideala teksta procesilo por preparo de multlingvaj dokumentoj, kaj inkluzivas ankaŭ la rusan. Ĝi estas nun la plej

vaste uzata en Rusio, laŭ pritakso de la revuo PC World/Russia ĝi estas aplikata de 75 %oj de komputiloj.

La nova versio de "Leksikono" ebligas samtempe uzi kelkajn eŭropajn lingvojn en unu dokumento (inkluzive la rusan), do ĝia e-kapabla versio ŝajnas esti tre taŭga por la rusiaj e-asocioj, e-centroj, individuoj.

Interesitoj pri la projekto, kaj komputistoj, programistoj skribu al:

*Centro pri Esperanto-Kulturo-Ekologio
pr. Mira 196-44, RUS-129128 Moskvo, Rusio.
Faksno: +7-095-2926511 RAISS 6845
E-mail: shmerl@micro.msk.su*

**LA SEKVAN NUMERON DE EVENTOJ RICEVAS NUR TIUJ,
KIUJ RENOVIGIS SIAN ABONON POR 1993!**

Movado

E-lingva paĝo en nacilingva kultura gazeto!

En la 20-aj jaroj (t.n. heroa epoko de nia movado) estis ofta fenomeno, ke diversaj naciaj ĵurnaloj havis e-lingvaj rubrikojn, paĝojn.

Tiun tradicion sukcesis daŭrigi (aŭ revivi) s-ano Jan Lamačka en Trenčin, Slovakio, kiu laŭ interkonsento kun la regiona kultura magazino "Povazie" ekde oktobro havas tutan paĝon (!) por materialoj en kaj pri la internacia e-movado.

"Povazie" aperas en slovakia lingvo, en formato A-4, monate en 28 paĝoj, kaj estas kultur-societa, informa, ilustrita

ta periodaĵo kun kelkaj komercaj anoncoj.

Por fari similajn aferojn certe estas utile peti specimemon de "Povazie" de la eldonejo (ul. Kniezata Pribinu č. 26, Trenčin, 91101 Slovakio).

Pri preparaj detaloj, kaj por aliaj informoj vi povas turni vin al la gvidanto de la rubriko "Tra la mondo":

Ján Lamačka,
911 01 Trenčín-Juh, Halašova 8/1, Slovakio

TRA LA MONDO

INFORMACIE UZIVATELOM A PRIAZNIVCOM
NEUTRÁLNĚ REČI ESPERANTO

ESPERANTO V PRAXI

2. 12. 1972
Martin: V kultúrnem dome Turčianskych strojníkov sa konalo tradíčné stretnutie esperantistov, ktoré viedol a konvenoval Augustín Čambal. Referát o stave a zámeroch esperantského hnutia do budúcnosti prednesol MUDr. Ľudovít Izák, odborný lekár.

REĈOU HISTORIE

3. 12. - 5. 12. 1982
KED - Kultúrne esperantské dni v Poprade, na počesť MUDr. Alberta Škarona, spoluzostora prvej slovenskej učebnice esperanta.

9. 12. - 10. 12. 1967
V Trenčianskych Tepliciach sa konalo podnetné stretnutie študentskej rubriky ESPERANTO, uverejňovanej v bratislavskom týždenníku SMENA NA NEDEĽU. Podujatie organizácie pripravili esperantské kluby z Novej Dubnice, Trenčína a Piešťan.

10. 12. 1866
Narodil sa Dušan Makovičky, MUDr., osobný lekár L. N. Tolstého a dôvery priateľ MUDr. Alberta Škarona.

12. 12. 1970
Esperantské stretnutie v Novom Meste nad Váhom, vrátane rečníčnej súťaže v prednese esperantskej poézie. Prémia získali Jozef Šliavka z Trenčína, Anna Bulejová z Martina a Ľuba Habšudová z Púchova.

14. 12. 1931
Rozhlasová stanica Bratislava vysiela prednátku "Z histórie slovenského národa" v esperante.

24. 12. 1987

Hungara angulo

La E-fako de Gimnazio Bánya Júlia en Kecskemét organizis jam la 2-an tutlandan "lernejan konkurson pri arta tradukado".

La konkurso estis aranĝita en du kategorioj: mezlernejan kaj bazlernejan, kaj partoprenis ĝin entute 186 geknaboj el 13 lernejoj!

Gajninto de la mezlerneja kategorio estas Szilvia Vasvári el Pápa (Instruisto: József Németh), de la bazlerneja kategorio Zsuzsanna Nagy el Miskolc (instruisto: Gézáné Magyar).

La plej sukcesintoj ricevis diplomon kaj libronacon. Ni dankas kaj gratulas al ĉiuj, kiuj helpis kaj partoprenis la konkurson.

Géza Kurucz, Kecskemét.

"Fiŝ-tago"

La sekva, jam 11-a Tutlanda Fiŝtago okazos la 30-an de januaro (sabato) ekde 8.27 en la nova klubejo, malantaŭ la muzeo de Aquincum: Budapest, III. Sujtás u. 3.

Pliaj informoj:

Péter Rados, 1031 Bp. Varsa u. 8. I/3

VENDREDAJ VESPEROJ

En la centra budapeŝta E-klubejo "ESPEREJO" startas nova program-serio, kiu donas eblecon por prezentado aŭ sinprezentado de esperantistoj. La programojn gvidos Oszkár Princz.

La unuan vesperon, 29-an de januaro je la 19a horo Miklós dr. Fehér prezentos siajn tradukojn. Bonvenon por literatur-amantoj!

Opinioj

Ne nur UEA agas en Afriko

Mark Fettes respondis en EVENTOJ nov.(2) al Joakimo Werdin pri ties kritiko al UEA.

Fettes povus - certe senintence - per unu frazo en tiu artikolo ĉagrenigi iujn el miaj kunlaborantoj. Tial mi rapidas komenti la frazon: "Eŭropanoj eventuale ne rimarkas tiun agadon (la azian kaj afrikan), sed por miloj da ne-eŭropanoj UEA estas la sola organizaĵo, kiu serioze klopodas inkluzivi ilin en la e-movadon."

Se temas pri Afriko, mi devas tuj korekti. Krom UEA estas aliaj internaciaj e-organizaĵoj (SAT-Amikaro, UFE, EAB, SEF ekzemple), kiuj delonge kaj multe okupiĝas pri esperantistoj en Afriko. Krom tiuj, ekzistas multaj kluboj kaj societoj, kiuj same agas.

Do UEA, kvankam ĝi iniciatis tiun labor-kampon en 1980, tute ne (kaj feliĉe ne!) plu estas la sola organizaĵo kiu klopodas inkluzivi afrikajn esperantistojn en la movado.

Hans Bakker, Nederlando

Iniciatite de deputito Marco Panella la Eŭropa Parlamento decidis fari studon pri esperanto kaj pri ĝia uzeblo en Eŭropo

ĈU ESPERANTO ĈE LA EŬROPA PARLAMENTO?

Komuniko de Elio Vito (kunordiganto de la parlamenta intergrupo "Pri la lingvo kaj por reformo de la lingva politiko") kaj de Giorgio Pagano (sekretario de ERA - Esperanto-Radikala Partio):

Marco Panella, membro de la parlamenta intergrupo kaj de ERA, en la pasinta somero prezentis al la Eŭropa Parlamento rezoluciproponon por akceli en Eŭropo la uzadon de ne-etna lingvo kiel esperanto, ĉefe pro ties lingvodidaktikaj ecoj por lernado de fremdaj lingvoj.

Sekve de tio la 26-an de novembro ĉe la 12-a komisiono de la Eŭropa Parlamento, oni decidis fari enketan studon pri esperanto kaj la internaciaj lingvoj.

Kun kontenteco ni ricevas tiun ĉi unuan rezulton, atingitan nur tri monatojn post nia unua iniciato en tiu Parlamento.

Ni bone scias, ke la vojo estas ankoraŭ longa kaj tre peniga por ke tiu ĉi fundamenta elemento de supernacia demokratio estu definitive akceptita de la landaj kaj de la Eŭropa Parlamentoj.

Oni sciu, ke la pasintsomere prezentitan proponon ni ne lasis dormi: okazis interparoloj kaj leteroj al s-ro La Pergola (prezidanto de la 12a komisiono), al la membroj de la "Komisiono pri kulturo, junularo, edukado kaj informiloj" en Bruselo kaj Strasburgo, okazis la starigo de la menciita intergrupo ĉe la itala parlamento, kaj fine, komence de decembro estis forsenditaj la invitleteroj por starigi transnacion intergrupon ankaŭ ĉe la Eŭropa Parlamento.

En la jaro 1992 estis nur 500 esperantistoj, kiuj membriĝis en la transnacia Radikala Partio. Estas ili tiuj, kiuj donis al ni la forton ankaŭ por tiu ĉi plia engaĝiĝo kaj pruvo de seriozeco: ilia kaj nia.

Oni pensu: kion ni estus povintaj produkti kun 5000 aliĝintaj esperantistoj?!

Pliaj informoj estas akireblaj ĉe:

Esperanto-Asocio de la Radikala Partio,
ERA-KODO, Via di Torre Argentina 76,
I-00186 Roma, Italio.
Telefaksno: +39-6-6545396.

esperantista asocio de la Radikala Partio

"Esperanto" Radikala Asocio



E.R.A.-K.O.D.O.



KunOrdigo por la Demokrata eŭropa kultura integriĝo

Via di Torre Argentina 76 - 00186 Roma - Italio. Telefono +39.6.689791, telefaksno +39.6.6545396, teleksno 610495 prilife

Priŝtelo de E-oficejo!

La 11-an de decembro okazis ŝtelego en nia oficejo de Norvega Esperanto-Ligo, kaj malaperis niaj komputilo kaj fotokopiilo.



Feliĉe la aliaj aĵoj estas netuŝitaj: la telefona respondilo, la poŝtmarkoj, ĉiuj laborpaperoj - kaj ne malplej grave, la disketoj kun la antaŭsemajna enhavo de la komputilo.

La ekonomia sekvo de la perdoj estas ankoraŭ ne klara -tio dependas de la prijuĝo de la asekura kompanio. Sed ioma perdo tute certe estos, kaj ankaŭ forkonsumo de multa valoro tempo por ordigi la aferon. Ankaŭ la sekva "Norvega Esperantisto" povos aperi nur iam en januaro.

Tia ŝoka travivaĵo havas ja ankaŭ psikajn efikojn, kaj povus atenci la kunlaboran etoson. Sed ĝi povas efiki ankaŭ male: en tempo de krizo fortigas interna solidareco kontraŭ ekstera minaco. Ni zorgu, ke tiel okazu ankaŭ ĉe ni.

HKn/DD

el sciigo de Norvega Esperantisto "6"/92.

Nova ondo en Albanio

"Ni estas mezlernejoj, 17-jaraj, kiuj komencis lerni e-on unu jaron antaŭe. Ni volas starigi kontaktojn kun diversaj junularaj grupoj, korespondi kaj gastigi vin ĉi tie. Kiel helpo al nia agado ni kore dankus e-lingvajn legajojn. Esperante pri diverslandaj kaj reciprokaj kontaktoj viajn leterojn atendas Junulara E-grupo FUTURESP, Gentian Ymeri, Poste Restante Tirana, Albanio."


Kien iras BEA?

En septembro okazis la 43a kongreso de Bulgara Esperanto-Asocio, BEA. En ĝi partoprenis 134 delegitoj, kaj proksimume 200 gastoj. Oni atendis multon de tiu ĉi kongreso, ĉar ĝi estis la unua post la faritaj ŝanĝoj en 1990 kiam la antaŭa prokomunista estraro estis renversita. Cetere antaŭ la kongreso ekzistis du kontraŭaj grupoj, kaj estis verŝajna kolizio...

Feliĉe la Asocio ne dispartiĝis, sed restis unueca, malgraŭ la ekzistanta ekzemplo de aliaj bulgaraj organizoj, ĉar nun preskaŭ ĉiu pli grava politika partio aŭ sindikato havas sian ĝemelo(j)n kaj ni havas eĉ du sinodojn kaj du muftiejojn.

Evidentiĝis, ke la granda plimulto de la bulgaraj esperantistoj subtenas la radikalan ŝanĝon de la Asocio, kiu esprimiĝas en ĝia demokратиigo kaj eksterpolitikeco de la esperantista vivo. Kompreneble estis kontraŭaj opinioj pri diversaj detaloj, sed mankis principaj kritikoj, direktitaj al la politiko de la estraro, kiu alfrontis multajn problemojn, ligitajn kun la transformoj okazantaj en la tuta socia, politika kaj ekonomia vivo. Ekzemple ĝis la pasinta jaro restis nesolvebla la jura stato de BEA; pro la malfavora ekonomia situacio unu el la firmoj de la Asocio bankrotis kaj la aliaj stagnas; estis hereditaj multaj nesolvitaj problemoj kun la strukturo de BEA kaj ĝia oficistaro.

Nun, post sobriga periodo por la tuta socio evidentiĝas la reala organiza stato. En 1992 la anaro de BEA estas 3500 (ne la iamaj 10.000;



- kiom da "mortintaj animoj"?), kaj funkcias 82 societoj.

La delegitoj aprezis la rezultojn de la estrara laboro, kio videblas ĉe la elektoj. Preskaŭ la tuta estraro estis reelektita kaj por prezidanto estis aprobita Georgi Mihalkov, eble pli konata kiel Julian Modest.

En la kongresa rezolucio estis plifortigita la raŭmismo linio en la politiko de BEA por plialtigo de la lingva nivelo, servo al la membroj kaj kreado de kulturaj valoroj. Kontribuon al nia kultura vivo faras ankaŭ la Bulgara Esperanto-Tatro, kiu gajnis aplaŭdojn dum la UK en Vieno pro sia spektaklo. Plivigliĝis la libroeldonado. Aperis multaj novaj kaj valoraj libroj eldonitaj ĉe Pres-Esperanto. En Vraca, la urbo de la okazonta IJK'93, estis kunorganizita kun LF-Koop la 11-a internacia Literatura Forumo.

La unuan fojon la kongreso de BEA havis temon "La respondeco krei generacion", dediĉita al la gravega rolo de la junularo, ĉar kiel diris la 15-jara Edmond Privat en Boulogne-sur-Mer: "Varbi maljunulojn estas vane labori, ĉar ili ĉiuj baldaŭ mortos kaj estos perditaj por la movado". La temo estis respegulita en la kongresaj dokumentoj. Eble ankoraŭ ne ĉiu alkitimiĝis al tiu ĉi novaĵo.

Estis emfazita la neceso de pli bona informado kaj pli fortaj ligoj inter la estraro kaj la lokaj societoj. La plej grava ligilo ĝis nun restas la revuo "Bulgara Esperantisto".

Konklude oni povus diri, ke BEA daŭrigos sian vojon per novaj fortoj, refreŝigotaj de la venonta IJK en Vraca, kies aliĝilo jam aperis, kaj superos la barilojn de la komplika enlanda situacio celante pli altan kvaliton en la agado.

Aleksandr Ŝivarov, Bulgario

I L E I

En 1993 ILEI volas klare meti la emfazon al instruista trejnado. Ni elkalkulis la proksimuman instruadan bezonon por pluvivigi parolkomunumon de miliono da homoj, praktike sen denaska fonto de novaj parolantoj.

Ni taksis, ke necesus logi ĉ. 200.000 homojn al kursoj ĉiujare por rikolti 40.000 parolantojn kaj uzantojn. Tio postulas daŭran popolon da 10.000 instruistoj. Por teni tiun popolon stabila necesas trejni ĉ. 500 novajn ĉiujare, kio postulas krei kernon de instruisto-trejnistoj.

ILEI ne havas forton tuj atingi tiun nivelon, ĉi tamen starigis al si la defion proponi 50 lokojn en instruistaj kursoj en 1993 kaj 100 en 1994. Modestan ekpaŝon ni prenis per tri-taga intensa kurso pri komunikada instruado en la E-Centro en Poprad, Slovakio frue en novembro. Ĝi logis nur ok partoprenantojn, tamen el kvar landoj, kaj la plimulto estis praktikantaj instruistoj.

En 1993 ni proponos almenaŭ tri kursojn.



D-ro Duncan Charters, brito vivanta en Usono, gvidos la plej ampleksan, antaŭvideble du-semajnan en Kultura Centro Esperantista (KCE) en Svislando inter 6-17 de julio. Ankaŭ la poprada kurso, bazita sur la lernolibro *Tendaraj Ragoj* estos ripetita.

En la nova jaro ni kompilos registron de tiuj gvidantoj de instruistaj kursoj. Ĉiu skizos

la specojn de kursoj proponebaj, kun diversaj daŭroj, cel-grupoj kaj instru-metodoj kaj la kondiĉoj bezonataj. Tiun katalogon ni proponos al landaj asocioj kaj E-Centroj.

La malmultaj aliĝintoj al Poprad bezonas analizon. Ŝajnas, ke ILEI sukcesos

oferti 50 kurs-lokojn en 1993, sed pli debatablas la kapablo trovi 50 taŭgajn kursanojn en la nunaj ekonomiaj cirkonstancoj. Konkurenco de aliaj renkontiĝoj en la feria sezono ankaŭ malhelpas. Necesas fari kursojn ne nur por niaj nunaj instruistoj, sed ankaŭ por novaj, (ĉu de fremdaj lingvoj, ĉu de pacaj aŭ sociaj studoj) kiujn ni devos konvinki eklerni esperanton.

Nia prioritato: Instruista trejnado

Necesas kelkaj bazaj paŝoj:

- Havigi por niaj movade organizitaj kursoj minimuman agnoskon ĉe edukaj instancoj, tiel ke instruistoj estu liberigitaj kun salajro partopreni.
- Disponigi lokojn en tiuj kursoj preskaŭ senpage por instruistoj kun nesufiĉaj propraj rimedoj.
- Organizati kursojn ne nur en E-Centroj, sed ankaŭ laŭ oficiala sankcio en centroj de naciaj aŭ aliaj edukaj instancoj, kadre de la normala programo de instruista trejnado aŭ plutrejnad.
- Sisteme starigi reton de homoj, kapablaj trejni la instruisto-trejnistojn. Tiun temon ni atakos kune kun d-ro Charters okaze de lia vizito al Eŭropo somere.

Tiuj argumentoj bezonas detaligon kaj transformon al kohera laborplano.

Ni rekomendas membrecon en ILEI al ĉiu, kiu instruas, okupiĝas pri edukado aŭ rekonas ĝian gravecon al nia movado kaj komunumo. Ĉion bonan por la nova jaro deziras

Stefan MacGill, prezidanto de ILEI

Karaj legantoj!

En la numero januaro (1)-93 en la rubriko "Esperanto defendata" aperis la artikolo: "1.4 miliardoj de ekuoj", represita el la bulleto "Esperanta Ŝako" n-ro 4/1992.

Kun surprizo ni eksciis, ke la artikolo estas nemenciita (!) represo de aperinta artikolo, verkita de Claude Piron el la gazeto "La Partio Nova" de la itala Radikala Partio en marto 1992.

Kvankam ni ĉi-kaze estas senkulpaj, ni pardonpetas de C. Piron kaj de "La Partio Nova" pro la nemencio de ilia nomo.

En la antaŭa numero ni petis vian helpon por pligrandigi la nombron de abonantoj. Ni dankas viajn ĉi temajn telefonojn, leterojn, kaj laŭ la propono de Josef Denver (Argentino) sur la suplementa folio vi trovas (fotokopieblan, pligrandigeblan) afiŝeton por helpi la varban laboron. Kun sinceraj dankoj:

Szilvási László



En mia artikolo "Kiel instrui..." mi trovis du ... (mi ne scias kiel nomi ilin, ĉu eraroj aŭ korektoj).

Temas pri ŝanĝo de vortoj "konataĵo, nekonaĵo" al "konaĵo, nekonaĵo", kaj tiu dua estas erare legita, temis pri "uzante KIdemandojn kaj EVITANTE ĈU-demandojn" - ne evidente kiel vi presis.

Mi devas konfesi, ke mi ege ne ŝatas kiam oni korektas miajn tekstojn. Tiuj ŝanĝoj ofte kripligas la tekston, kaj ŝanĝas eĉ la signifon (!), kiel tiu evidente anstataŭ *evitante*. Mi celis ĝuste la inverson, ĉar instruantoj uzas tro da ĈU-demandojn kiuj estas nur ripetaj, do ne kreivaj. Mi esperas, ke vi ne MISkomprenos min.

Mila v.d. Horst-Holinska, Nederlando

Kara Mila,

La koncernan artikolon (bedaŭrinde) ni retajpis ne rekte el IPR, sed el la gazeto "Kroata Esperantisto" jaro 1, numero 1, paĝo 9, kie ni unue trovis ĝin.

Krom la tre oftaj mallongigoj, laŭenhave ni ne re-redaktas la tekstojn. Kompreneble ni korektas lingvajn erarojn, aŭ ŝanĝas vortojn por lingva konsekveneco, sed plej ofte ni nur faras lingvan plisimpligon, ke la teksto estu pli facile komprenebla.

La supraj ŝanĝoj neniel povas influi la enhavon de la koncernaj materialoj. Tiuj artikoloj, kiuj venas rekte al ni, plej ofte (pro la kompetenteco de la verkintoj, i.a. ankaŭ de Vi) estas praktike neŝanĝitaj).

La redaktan laboron ĉe aliaj gazetoj, revuoj, ni ne povas influi. Ni pardonpetas kaj de Vi, kaj de aliaj aŭtoroj, kiuj - eble - spertas similajn problemojn, kaŭzantaj de la represo de jam aperintaj artikoloj. Estimplene

Szilvási László

Embargo de rusia e-eldonejo por la rubla zono

Letero de leganto al la redakcio de la revuo "Ruslanda Esperantisto":

... "Vi menciis, ke la eldonejo "Sezonoj" dum la librotego okazinta en UK-77 prezentis 10 titolojn. Brave! En aliaj gazetoj oni povas legi favorajn recenzojn pri Sveda Alumeto, La majstro kaj Margarita, Metropoliteno k.a., sed kie tiuj libroj akireblas kontraŭ rubloj? Ĉu la eldonejo strebas konkeri la okcidentan merkaton, kiu laŭ H. Mayer estas tre limigita. Sendube tio donas al la eldonejo financan subtenon, sed venis tempo turni la rigardon al ruslandaj esperantistoj!"

Sergej Strelec, Ĉeljabinsk

Respondo de la redakcio:

...Sezonoj estas privata firmao, kies eldonpolitiko evoluas laŭ la merkata sistemo. Tial oni ne planas vendi la librojn ruble (= senpage disdoni) en Ruslando antaŭ la saturigo de la okcident-deviza merkato,

multe pli dinamisma ol kredas kolego Mayer. Enlanda disvendo nepre rezultigus prez-dumpon en la okcident-deviza zono, kaj la 'okcidentaj' libroservoj rifuzus plu aĉeti la librojn kiuj paralele vendiĝus kontraŭ dekona prezo.

Konata ekzemplo estas "La danĝera lingvo", kiun nialandanoj dum du jaroj disvendis kontraŭ 3-5 guldenoj, apud la fiksitita prezo 66 gld. Rezulte plej suferis la libroservo de UEA kaj aliaj 'okcidentaj' libroservoj, kies latentaj klientoj preferas aĉeti la librojn nigre je grave dumpita prezo.

Nur indignon meritis lerta ruso, vendinta pirate en la UK kontraŭ prezo egala al tri bieroj la ekz-on de La majstro kaj Margarita, ĵus donacitan al li en Vieno. Tial Sezonoj anoncis embargon de ĉiuj siaj libroj por la rubla zono. Por veraj literatur-ŝatantoj estas planate fondi libro-klubon ĉe Sezonoj.


el Ruslanda Esperantisto 11/92.

Esperanto en radio

Esperanto-elsendo - per satelito!

La 27-an de decembro Radio Vatikana prezentis sian jarfinan leterkeston. Entute dum 1992 la E-redakcio de Radio Vatikana ricevis 926 korespondadojn el 45 landoj. La 1-an lokon okupis Germanio per 168, la 2-an lokon Italio per 141, la 3-an Ĉeĥoslovakio per 87, la 4-an Nederlando per 76 kaj la 5-an lokon Polio per 60 aiskriboj. Por komparo, pasintjare la E-redakcio ricevis 60 pliajn leterojn, do daŭras la malkresko de la korespondadoj.

Verŝajne pluraj el ni timas, ke ankaŭ Vatikano ĉesos la elsendojn de E-lingvaj programoj. La Radio Vatikana povas trankviligi ĉiujn. La rilatoj de la E-redakcio kun la estroj de la Radio estas bonaj. La E-redakcio havas la impreson, ke kvankam ne



oficialigita per propra statuso, tamen la E-elsendoj estas plene akceptataj kaj rigardataj kun simpatio kaj tute sen duboj pri ilia utilo kaj signifo. Krome, esperanto bone fartas ĉe Radio Vatikana, ĉar ĝia universaleco tre bone kongruas al la universaleco kaj tutmonda spiro de la tuta Radio.

La 1-an de januaro 1993 en la E-programo estis preparolita la mesaĝo de la Papo okaze de la monda tago por la paco. Tiu 1-a programo de 1993 havis apartan karakterizon, ja ĝi estis la 1-a

per-satelita elsendo de la E-programo de la Radio Vatikana.

Se vi nun opinias, ke la E-redakcio de Radio Vatikana okupas la unuan lokon de religiaj elsendoj dum

la kristnaska tempo, vi malpravas, ĉar Pola Radio - pro sia ĉiutaga elsendoritmo - prezentis plida religiaj programeroj.

Radioleo

Korespondi deziras

Mi deziras korespondi kun filatelistoj el la tuta mondo, kaj akceptus superfluajn E-gazetojn. Eugeniusz Piasecki, ul. J. Matejki 2, PL-67400 Wschows, Polio

Serĉas korespondajn partnerojn 13 jaraj lernantinoj:

- Adrienn Bálint, Margaréta u. 4/3, H-8500 Pápa, Hungario.
- Annamaria Édl, Liliom u. 2/5, H-8500 Pápa, Hungario
- Andreo Patyi, lernanto, 13 jara, Bástyá u. 22, H-8500 Pápa, Hungario.

Mi volas korespondi kun diverslandaj esperantistoj: S-ino Natali Osminina, LT-5818 Klaipeda, Iguolos 24-60, Litovio.



"Jerusalem Bulteno estas individua gazeto pri literaturo kaj evoluo de aliaj esperantaj aferoj en la regiono". Ĝi aperas en 4 paĝoj, en formato A-4, okupigas ĉefe pri judismo, kaj pri ties teorio. Titoloj de la 12-a numero: Ĉu ili validas - la solvoj de Marks-Leninismo? // La devo gastigi en judismo // Kia varo, kia ĉaro!? - pri la lingvo E-o kaj ĝia perspektivo // La Centro Sivron.

Interesiĝantoj skribu al:

Jeremi Gishron, Centro Sivron, Pk. 23180, IL-91 231 Jerusalem, Israelo.

Anoncetoj

Anoncetoj,
kiuj havas ian ajn rilaton al esperanto,
estas senpagaj

Somerumu en Keszthely, ĉefurbo de Balatono! Feridomo kun tri ĉambroj, du banĉambroj, kuirejo, por maksimume 8 personoj. Normala lu-prezo: 65 DEM. Se inter la gastoj estas esperantisto, vi ricevos 20 %-an rabaton! Ĉiu alia esperanto-parolanto signifas 2 % plusan rabaton. Adreso de la peranto:

József Németh,
Kilián ltp. 75/9, H-8500 Pápa, Hungario.

Pavla kaj Vlada Dvorakovi havas novan adreson: Ostravská 637, CS-19900 Praha 9, Letnany, Ĉeĥio. Tel./fakso: +42-2-899602

Mi posedas komputilon kaj praktikas ĝin sufiĉe. Mi volas konatiĝi kun eksterlandaj esperantistoj pri komputado kaj programado, kaj eventuale interŝanĝi programojn.

Mario Jose Miranda, Casilla 2910, Correo Central, 1000-Buenos Aires, Argentino.

La kunvenoj de Aŭstria Katolika Ligo Esperantista okazas ĉiam la 2-an kaj la 4-an mardon de la monato de la 17-a ĝis la 19-a horo en Dr. Pörnerheim (de Kreuzbund), Gschwandtnergasse 53/1, Vieno, 17-a distrikto. Letera adreso por antaŭaj kontaktoj:

Walter Mudrak,
Beatrix-Gasse 19/9, A-1030 Wien.

Du virinoj volas malfermi novan vendejon por disvendadi belajn modernajn virinajn subvestaĵojn, laŭeble italajn produktaĵojn. Ni serĉas kontakton por laŭeble plej malmultekoste akiri tiajn varojn, pleje bonvenus eblo por komisia vendado. Ni volus apliki vere konkurenckapablan prezon por sukcese funkcii. Ekskluziva laborlingvo: esperanto. Adreso por kontaktiĝo:

Imre Bajáki,
Pf. 138, H-6100 Kkfélégyháza, Hungario.
Fakso: +36-76-361-841

ĈU NOVA MONDA ORDO?

Sekvu la debaton en
la revuo

Monda Forumo

Plauener Str. 39,
DO-1092 Berlin, Germanio

EVENTOJ, eszperantó nyelvű információs lap.
Nyf. sz.: B/TSZL/85/1991. ISSN 01215-959 X.

A kiadó és a szerkesztőség címe:
H-1675 Budapest, pf. 87. Tel.: 1288258.

Megjelenik kéthetente. Kézbesíti a HELIR.
Készült az M & M nyomdában:
H-1181 Budapest, Tordai u. 15.

EVENTOJ, dusemajna gazeto pri la esperanto-movado.
Eldonas Kultura Esperanto-Asocio
kaj LINGVO-Studio, Budapest.

Respondeca eldonanto kaj ĉefredaktoro László Szilvási.
La redakcio ne nepre konsentas pri la enhavo de unuopaj artikoloj, kaj ne respondecas pri la anonc-enhavo.

Mia prefero por la vinruĝo ĉiam estos;
la flut' kaj la liuto rifuĝo ĉiam estos;
kaj, se el mia cindro potisto faros kruĉon,
plena de pura vino la kruĉo ĉiam estos.
Umar Kajjam

Letero al G. Waringhien

Kara Gaston Waringhien:

Oniskribe kaj onidire vi lasis nin en decembro, antaŭ pluraj monatoj. Nur unu fojon mi vidis vin persone, en la Universala Kongreso de UEA en Aŭsburgo, en 1985, kaj nur unufoje mi ricevis de vi leteron (precize: karton) okaze de enketo pri la dek plej belaj vortoj esperantaj.

Tamen dum la dek aŭ dekdu jaroj de mia esperantista vivo mi ofte vin renkontis en libroj kaj gazetoj kaj eĉ en edistudia kasedo ("Inter la arboj, sur la voj'..."). Kaj certe mi renkontos, ni renkontos vin plu.

Ĉar vi traloĝas mian ĉambron, miajn libro-bretojn. Kiam mi konsultas la zamenhofajn "Lingvaj Respondoj", de vi editoritajn, aŭ la klasikan "Parnasa Gvidlibro", kiun publike ni tabuas sed hejme asiduas, jen tie via nomo kaj ne nur via nomo. Kiel en via cetera verkaro dominas en ili erudicio kaj klero en enormaj kvantoj kune kun sana ironio kaj pipra distro-spico.

Klare mi vidas tion en viaj kvin volumoj da eseoj. Kiu ankoraŭ ne legis ilin, tiu ne konas la potencialajn esprimivon de esperanto nek, plej grave, viajn aktualajn kaj sen-egalajn atingojn. Onin ne surprizu la fakto, ke la pinton de la prireligia beletro en esperanto verkis ĝuste vi, Gaston Waringhien, "malfrua fil' de l' olda paganismo", per esearo "Ni kaj ĝi", tria en la serio.

Ankaŭ en kompilado de vortaroj vi aktivis unike kaj senrivale. Kiom ajn da pivoj ose eldoniĝos, al via PIVo ni revenos daŭre. La imponan "Plena

Interese...

Ilustrita Vortaro" vi akuŝis, slipon post slipo, en temp' senkomputila, kaj, kvankam teamo da kunaŭtoroj vin helpis en tiu tasko, ĉi PIVo restas kaj restos vivo-verko via.

Vi ankaŭ ĉefredaktis la faman "Nica literatura revuo", kaj kun via kolego kaj amiko Kálmán Kalocsay regalis la esperantistojn per titoloj tiel diversaj, kiel "Plena Analiza Gramatiko" aŭ "Kantoj kaj romanoj", traduko de poemaro de Heinrich Heine. Ĉar tradukiste vi suverenis, kiel pruvas, ekzemple, via redonode la robaijoj de Umar Kajjam, via persa prasamideano.

Kaj originalverke? En "Libro de Amo" viaj versoj igas min redifini la vorton "lascivo": la kremo de la scivolemo.

Viaj koploj en "Esperanta Antologio" memorigas nin pri via amo al (andaluzaj) virinoj. Hieraŭ mi relegis vian pseŭdonome geman (aŭ ge-maŭ-ran) poemaron "Du-onvoĉe". Kiaj poemoj! Plej impresis min la kvinstrofa "perdita esploranto". Kaj tre probable unu el la poemoj duonvoĉaj plej konataj de esperantistoj estas

via jena triverso:

Maro, zorga dommastrino,
faldas re kaj re, sen fino,
susure silkajn ondojn.

Pensante pri via forpaso mi ne povis ne fari adaptan por tiu ĉi letera nekrologo. Bonvolu rigardi ĝin ne epitafio, sed saluto kaj omaĝo de verkemul' samlingva kaj samnoma:

Morto, zorga hommastrino,
falĉas re kaj re, sen fino,
susure silkan fojnon.

Vian respondon mi divenas en la umaraj robaijoj. Ne dubu, ke via verkaro estos por ni vin-enhava, vin-plena cindro-taso, en kiu, ĉe nia sola tuŝo, lek' aŭ lego, vi revivetos.

Amike, via

Georgo Kamaĉo
el Boletín de HEF, majo-julio 1992.



INVITO AL (DAŬRA) KUNLABORO

kadre de renovigita Komisiono pri Eksteraj Rilatoj de UEA

En Vieno la nova Estraro de UEA decidis kunigi la fakojn "informado" kaj "eksteraj rilatoj" kaj taski ilin al mi.

Kvankam la du fakoj ne identas unu kun la alia (eksteraj rilatoj limiĝas al organizaĵoj kaj povas inkluzivi kunlaboron, konsultajn rilatojn k.s., dum informado kovras ankaŭ la ĝeneralan publikon, amaskomunikilojn ktp), mi kredas ke la lastaj tri jaroj da sperto pri la Informa Fakoj montras sekvidan vojon ankaŭ por niaj eksteraj rilatoj. La plej gravaj ŝanĝoj, kiujn mi proponas enkonduki, estas jenaj:

- la Komisiono pri Eksteraj Rilatoj estos multe pli granda, kaj inkluzivos aktivulojn pri eksteraj rilatoj el la landaj kaj fakaj asocioj kaj TEJO;
- la Komisiono havos propran bultenon, kiu servos al la interŝanĝo de spertoj, informoj kaj ideoj kaj la evoluigo de komunaj strategioj kaj projektoj;
- la laboro pri eksteraj rilatoj estos pli integrita kun la laboro de la Informa Fakoj kaj la Centro por Esp-

loro kaj Dokumentado (la kunigo de tiuj fakoj ĉe unu estrarano estas jam paŝo en tiu direkto).

Aldone vi trovas skizitan laborplanon, kiu inkluzivas tiujn punktojn sed klopodas analizi ankaŭ pli specifajn flankojn de la laboro. Jen kelkaj glosoj:

Strategio: per "engaĝo" mi celas ĝustigon, kio diferencigas eksterajn rilatojn de informado, nome aktivan kunlaboron ekster la movadaj kadroj. Nura pasiva reprezentado estas neefika, kaj nura pledado por la propra afero ofte fremdigas. Sed ni ja zorgas elekti, pri kiaj temoj kaj kiamaniere ni engaĝu nin.

Strukturo: Por eksteraj rilatoj gravas la organiza nivelo, en kiu oni aktivas. UEA donas la solan kadron, en kiu aktivuloj je landa, faka kaj internacia nivelo povas interŝanĝi spertojn kaj iniciatu komunajn projektojn: La Komisiono nek faros ĉion mem, nek trudos laboron al aliaj: ĝi ideos, diskutos, ekrealigos kaj invitos al kunlaboro.

Gravas ankaŭ la celgrupo. UN kaj

Unesko estas tradicie la ĉefa fokuso por UEA; neregistaraj organizoj estas ofta diskuttemo, sed malofte okazas kunordigita aŭ sistema agado ĉe ili. Inter la regionoj, Eŭropo estas ankoraŭ la plej grava, sed ni estas jam sufiĉe fortaj en aliaj regionoj (orienta Azio, Ameriko) por bezoni kunordigon.

Programo: Ĉi tie vi trovos kelkajn provizorajn celojn por la venontaj tri jaroj. Per via kunlaboro mi esperas jam baldaŭ realigi kelkajn kaj plikonkretigi aliajn.

Se vi pretas kunlabori en la renovigita Komisiono, mi petas vin pli-malpli tuj kontakti min kun viaj unuaj reagoj, kiuj konsistigos parton de la unua bulteno pri eksteraj rilatoj, dissendota ĉirkaŭ la jarfino. Se vi konas aliajn aktivulojn sur tiu kampo, bonvolu peti ilin proponi sin per kopio de tiu formularo.

Kun anticipa danko, elkore salutas

*Mark Fettes, estrarano de UEA
pri informado kaj eksteraj rilatoj,
3-332 Cumberland St. Ottawa,
Ont. Kanado K1N 7J2
Tel. +1-613-562 0785*

Laborplano pri eksteraj rilatoj, 1992-1995

I. Strategio

Engaĝo

II. Strukturo

1. Komisiono pri Eksteraj Rilatoj
2. Fakaj asocioj
3. Landaj asocioj (A: interne B: UN kaj Unesko C: neregistaraj organizoj Ĉ: regionoj).

III. Programo

A. Ĝenerale

- 1-3. - rekonsistigo de la komisiono laŭ pli vastan koncepton, ink. FA, LA, TEJO
- eldonado de bulteno pri eksteraj rilatoj (3 n-roj jare)
- kunlaboro kun Informa Fakoj kaj CED kadre de kampanjo

B. UN kaj Unesko

1. - komuna bulteno: en la angla, franca kaj E-o: tri numeroj jare
- kampanjo "Esperanto por monda demokratio" (vd. laborplanon pri informado)
- fortigo de la reprezentado en Novjorko, Parizo kaj aliloke per la varbado kaj

trejnado de aktivuloj

- plialtigo de la profilo de UEA sur la kampo de modernaj lingvoj, pcedukado kaj kulturo
- efektivigo de projektoj en la kadro de UN-Unesko: Jaro de la Familio, Bjalistoka Centro, k.a.
- 2. - kunlaboro kun FA pri kontaktoj kun specifaj fakoj, partopreno en fakaj konferencoj k.s.
- subteno al kaj kunlaboro kun Monda Kunagado por Eduko, Scienco kaj Kulturo
- 3. - kunlaboro kun LA pri kontaktoj kun landaj UN- kaj Unesko-asocioj, centroj, oficejoj k.s.
- kampanjo "Esperanto por monda demokratio" (vd. laborplanon pri informado)

C. Neregistaraj organizaĵoj

1. - sekvoj de UNCED: disvastigo de la Etika Kompromiso, konsilado pri ĝia plenumo
- kampanjo "Esperanto por monda demokratio" (vd. laborplanon pri informado)
- kunlaboro pri internaciaj projektoj de

komuna intereso

2. - kunlaboro kun FA pri kontaktoj kun internaciaj samfakaj asocioj
- kreado kaj disvastigo de pli specifaj informiloj por fakaj medioj
3. - instigi kaj helpi al LA membriĝi en landaj retoj kaj forumoj por NRO-oj
- kunlaboro pri naciaj projektoj de komuna intereso

Ĉ. Regionoj

1. - reprezentado de UEA ĉe regionaj organizoj: Konsilio de Eŭropo, KSKE k.a.
- difino de apartaj regionaj bezonoj kaj adapto de materialoj kaj metodoj al tiuj bezonoj
- 2-3. - kontribuado al strategioj kaj kunordigo de LA kaj FA je regiona nivelo
- kunlaboro pri informado kaj reprezentado ĉe regionaj instancoj, parlamentoj k.s.

La bultenoj pri eksteraj rilatoj servos al la plidetalingo kaj adapto de tiu ĉi programo. En la unua bulteno troviĝos pli da informoj i.a. pri la proponita kampanjo, kiu grave influos la agadon dum tiu ĉi mandato.

Por informi kaj esti informita...

LA PLEJ OFTA INTERNACIA GAZETO EN ESPERANTO

Aperas dusemajne

 *Eventoj*

Redakcia adreso:
Budapest, pk. 87.
H-1675, Hungario
Telefono kaj telefakso:
(+36-1) 1288-258

Internacia Sendependa Gazeto pri la Esperanto-Movado aperas ekde marto '92

*Represo de elektitaj artikoloj el aliaj E-revuoj,
kaj rapidaj informoj por aktivaj esperantistoj!*

**EVENTOJ aperas dusemajne,
kaj estas io alia, ol la kutimaj movadaj gazetoj...**
Abonu kaj kunlaboru ankaŭ Vi!

H-1675 Budapest, pk. 87.